# TRA ESPERANTIO

## Peranto de SAT kaj ties laboroj

Aŭdante ion pri laboroj de peranto de SAT, la Gek-doj plej ofte pensas, ke temas pri enkasado de kotizoj kaj abonoj aŭ pri servoj rilate al vizitantaj SAT-membroj, do, pri servoj tute interne de la kadro de SAT. Certe tiaj servoj estas plenumendaj, sed ili ne alportas fruktojn rilate al la propagando por esp-o, des malpli por SAT. Ke tiaj servoj ne estas la ĉefaj taskoj de peranto de SAT, tion mi provas montri per la sekvantaj linioj.

En la statuto, ĉapitro 1, sub a), ni povas legi, kiel SAT tute klare celas "utiligi praktike la internacian lingvon ESPERANTO por la klasaj celoj de la laboristaro tutmonda". Tiu ĉi statutpunkto entenas la ĉefan taskon de peranto de SAT. Mi nun provas klarigi la manieron ebligantan, ke ni perantoj plej efike povu realigi tiun ĉi statutpunkton.

Antaŭ ĉio estas necesa, ke la peranto de SAT estu ano de iu partio aŭ laborista organizo; ne estante ano de tiaj organizoj ne estas eble al li, propagandi sian celon. La plej granda parto el la proletaj organizoj certe korespondadas kun la eksterlando rilate al siaj organizaj problemoj. En tiun ĉi koresp. aferon la peranto nun devas sin trudi. Tiu korespondado estas unu el la ĉefaj ebloj, kie li povas utiligi praktike esp-on. Unuamomente la gvidantoj de la lab. organizoj certe ne brakmalfermite akceptas tiajn ofte eĉ ne deziratajn servojn de la trudemulo; sed jam post la unua sukceso iliaj opinio kaj sinteno tute aliiĝas. La sperto jam montris, ke internacia korespondado pere de esp-o rezultigis pli bonajn sukcesojn ol aplikado de tradukantoj kaj interpretistoj de "vivantaj" lingvoj.

Sperta peranto nun kompreneble ne proponas al la organizoj sian okazan, do hazardan, helpon; li ekagos ruze! En la proleta esp.-gazetaro li trovas multe da adresoj de interesuloj, kiuj volonte interkorespondadas pri la plej diversaj aferoj kun partiaj aŭ sindikataj rondoj. La peranto nun "ruligu la ŝtonon" per tio, ke li sciigas la adresojn de siaurbaj organizoj, kiujn li celas prilabori, al tiaj eksterlandaj rondoj. La sekvo estas, ke la celitaj organizoj el eksterlando ricevas leterojn esp.-lingve skribitajn; ne kapablaj legi ilin, la organizoj vole-nevole devas interrilati kun la lokaj esp.-grupo aŭ membroj, nome pro la interpretado. Kaj nun la peranto ekfunkcias. Tiel la interkorespondado komenciĝis sen scio de la organizoj pri la metodo ruza de la peranto. Per tia interpretado certe la reputacio de la peranto ĉe sia partio aŭ sindikata rondo grave plialtiĝas. Tiel mi organizis rektan interligon nur pere de mia interpretado kun eksterlandaj interesuloj, kun grupoj, sindikatoj kaj partioj. Mi povas konstati, ke tia korespondado, komencita pere de esp-o, tute ne plu finiĝas, ĉar la pensoj pli bone estas transigeblaj per niaj lingvo kaj helpo ol per ia profesia interpretado de persono, kiu faras sian laboron kvazaŭ devige. La frukto de tia pera laboro estas interesiĝo de la menciitaj organizoj pri esp-o kaj pri SAT, des pli, ju pli multe da eksterlandaj leteroj alvenas. Per si mem aŭ pro estimo al esp-o nenia organizo emas al nia lingvo, ili unue volas vidi la tujan utilon de esp-o.

Duan metodon propagandi la utilon de esp-o prezentas la tielnomataj "Tagoj" aŭ Kongresoj. En ĉiu urbo ĉiujare la proletaj organizoj okazigas oficialajn kunvenojn, ĉu urbajn, distriktajn aŭ tutlandajn. La peranto sciigu sufiĉe frue sian eksterlandan Gek-daron pri tiaj "Tagoj", petante pri alsendo de "Salutleteroj" kaj similaj interesaĵoj. Estas vere mirinda, kian impreson vekas tiaj leteroj alvenintaj el eksterlando okaze de lab. festoj. Tiaj leteroj estu tradukataj kaj voĉlegataj dum kunvenoj; la aplaŭdado estos grandega. Kaj ĉu ekzistas pli efika rimedo, propagandi internaciismon kaj solidarecon de la Proletaro tutmonda, ol tiaj salutleteroj kaj bondeziroj de la frataro en eksterlando, nur pere de esp-o alvenintaj?

Niaj organizoj ja estas organizitaj internaciskale, sed pro la lingva diverseco ili fakte restas nur sekcioj de la "Internacioj". Nur pene ili kapablas interrilati kun eksterlandaj frat-organizoj pere de interpretistoj, kiuj ofte nur tradukas la laŭvortan tekston kaj tute ne interpretas la entuziasmon kaj la temperamenton. Nur la esp-istoj kaj el tiuj nur la proletaj estas konsekvencaj internaciistoj, komprenintaj la signifon de la instruo de Karl Marks: "Proletoj ĉiulandaj, unuiĝu vin!" Ili scias, ke unuiĝo estas ebla nur post la realiĝo de interkompreniĝo, kiun ebligas al ili esp-o.

Tria metodo estas organizi interkorespondadon de fabriko, laborejo aŭ kooperativo al samspecaj en eksterlando. Oni surpriziĝas, vidante, kiel scivole kaj malpacience la diversaj rondoj atendas la respondojn je siaj leteroj. Per tiaj interfabrikaj rilatoj plej efike povas esti pritraktataj la spertoj en laborista, partia, sindikata kaj socia vivo laŭ skalo internacia. Estas necese, ke la proletaro de unu lando sciiĝu pri la frataro precipe en tiaj landoj, el kiuj malofte venas iaj sciigoj. Ĉefa afero estas samtempa aperigo de la ricevitaj leteroj en la loka lab. gazetaro, por konigi ilin al pli vasta proleta rondo.

Multe da Gek-doj nun certe kredas, ke tiaj peraj laboroj kaŭzas sufiĉe da elspezoj. Jes, ili kaŭzas, sed mi povas doni tiurilatan konsilon. La peranto ne skribu unu leteron al unu adreso en eksterlando. Kopiante la leteron per multobligilo li povas forsendi por la sama sumo de leterafranko al eksterlando kvin leterojn kiel presaĵojn. Ne timu, ke ili ne atingos sian celon. Samtempe do la peranto povas priservi plurajn adresojn en eksterlando per unu letero, kio tre multe helpas al li rilate la interesigon de partiaj kaj sindikataj rondoj por nia lingvo, se la respondoj venas abunde el la plej diversaj anguloj de la tero por tiaj "Tagoj".

Kompreneble ekzistas ankoraŭ multe da okazoj kaj ebloj, "utiligi praktike la internacian lingvon esp-o por la klasaj celoj de la laboristaro tutmonda"; ili dependas de la lokaj cirkonstancoj. La ĉefa atingo estas, ke tiaj metodoj plej bone efikas je la disvastigo de nia lingvo inter la proletaj organizoj, ĉar la peranto tuj povas montri la nerefuteblan sukceson kaj utilon de esp-o. Oni ne forgesu, ke neesp-istoj ne jam scias la esencon de nia lingvo kaj pro tio ofte ne emas lerni "novan" lingvon krom la "vivantaj". Nura propagando por esp-o ofte eĉ trovas malsimpation ĉe la organizoj pro tio, ke ili timas perdi siajn plej bonajn membrojn favore al la esp. movado. Fakte multe da esp-istoj per sia sinteno pravigis iagrade tiun timon. Male, la supre diritaj metodoj kreskigas ĉe la organizoj la estimon por esp-o kaj ili eĉ — tio estu la celo de la peranto — kreas la bazon, por aranĝi kursojn por pluatanta klaso, ĉar per sia agado ili celas dormigi la proletaron, pasivigi ĝin, por ke ĝi ne batalu por siaj klasinteresoj.

Einar Adamson.

---

**La liberpensula fakkunveno** dum venonta SAT-kongreso okazos mardon, la 6-an de aŭgusto, je 20-a horo en la popoldomo de Leipzig. Nepre partoprenu. Ni volas krei pli firman fundamenton por nia Sekcio. Ĉeestos konataj gvidantoj de la liberpensa mondo. Proponojn koncerne la tagordon, dezirojn ktp. adresu al la sekretario.

---

**Nia poŝto. 1180.** Mi atendas la daŭrigon de via artikolo. Sed zorgu, ke ĝi ne tro longiĝu.

**En la du lastaj semajnoj**

**antaŭ la Leipziga Kongreso ataku per streĉita forto la malfervorulojn, la indiferentulojn inter la Gek-daro!**

**Ili ĉiuj fariĝu abonantoj**

**En tiu ĉi momento konfirmu vian konfidon al "S-ulo" havigante al la gazeto ĝian**

**4000-an abonanton!**